


GAZETO ESPERANTISTA ELIRANTA LA 15^{de} DE ĈIU MONATO.



LA BELGA SONORILO

JOURNAL ESPERANTISTE BELGE
MENSUEL.

BELGISCH ESPERANTISCH
MAANDSCHRIFT.

Oficiala Organo de la « Belga Ligo Esperantista » kaj de la Belgaj Ligaj Grupoj.

Organe officiel de la « Ligue Espérantiste Belge »
et des Groupes Belges Affiliés.

Officieel orgaan van den « Belgischen Esperantischen
Bond » en der Belgische aangesloten Groepen.

DIREKTORO: D^{RO} M. SEYNAEVE, 51, RUE DU PALAIS, VERVIERS.

REDAKTORO-ADMINISTRANTO: J. COOX, DUFFEL (BELGUJO).

RIMARKO

Laŭ sciigo trovebla sur la unua paĝo de ĉiu n^o, oni bonvolu, ĝis nova
ordono, ĉion sendi al la

REDAKTORO-ADMINISTRANTO en DUFFEL.

Prix des Abonnements :

Abonnement simple (au moins 1 an)	4,00 fr.
Avec inscription à la Ligue	au moins 5,00 fr.
Membre protecteur de la Ligue avec abonnement (Voir Statuts p. II)	au moins 10,00 fr.
Un numéro	0,40 fr.
Collections des trois premières années	chacune 5,00 fr.
pour l'étranger	6,00 fr.

Inschrijvingsprijs :

Enkele inschrijving (ten minste 1 jaar)	4,00 fr.
Met inschrijving in den Bond.	ten minste 5,00 fr.
Bond-Beschermmer (maandschrift inbegrepen, zie Standregelen, p. II)	ten minste 10,00 fr.
Een nummer	0,40 fr.
De drie vorige jaren	ieder 5,00 fr.
Buitenland	6,00 fr.

ABONOJ : 4 fr. jare. — Unu n^o : 0,40. — Kolektoj de antaŭaj jaroj, ĉiu 6,00 fr.

La date initiale de l'abonnement est le 1^{er} Septembre. — Si
l'on s'abonne dans le courant de l'année, on reçoit les Nos
de l'année déjà parus.

Het jaar begint den 1^{en} September. — Indien men inschrijft in
den loop des jaars, ontvangt men de vorige nummers.

ENHA VO.
(Sommaire. — Inhoud.)

Albumo de konataj Esperantistoj.
Niaj du gvidaj libroj en Esperanto.
Eĥoj kaj Novajoj.
Tra la Mondo.
Gratulojn.
L'Esperanto à l'Étranger.
La sabata gastablo de Antverpenaj
Esperantistoj.

Belga Kroniko.
Holanda Kroniko.
Diversajoj.
Poŝta Kesteto.
Bibliografio.
Amuzajoj.

A.-J. WITTERYCK-DELPLACE,

IMPRIMEUR-ÉDITEUR
BRUGES, NOUVELLE PROMENADE, 4.

DRUKKER-UITGEVER
BRUGGE, NIEUWE WANDELING 4.

OMBRO-BILDOJ


El la flandra ilustrata gazeto DE LUSTHOF, ĉe S^o A.-J. WITTERYCK, 4, N^{le} Promenade, Bruges;
jare: fr. 1,60 en Belgujo; fl. 1,20 en Holando.



Paĉjo Thomas'o.




Negro-kapo.




Kamel-kapo.



Ansero.



Elefanto.



Hund-kapo.

ESPÉRANTISTES!

Détachez cette feuille intérieure de la couverture et utilisez-la pour la propagande!

Belga Ligo Esperantista

Ligue Espérantiste Belge.

Belgische Esperantische Bond.

COMITÉ D'HONNEUR

MM. DUBOIS, Directeur de l'Institut Supérieur de Commerce d'Anvers.
le D^r GASTER, Directeur de l'Allgemeine Deutsche Schule, Anvers.
le Sénateur HOUZEAU DE LEHAIE, Mous.
le Frère ISIDORE, de l'Institut Royal des Aveugles, Bruxelles.
le Sénateur LAFONTAINE, Bruxelles.

EEREKOMITEIT

MM. A. LECOINTE, Ingénieur en chef honoraire de la Marine Belge, Bruxelles.
J. MASSAU, Professeur à l'Université de Gand.
MOURLON, Directeur du Service Géologique de Belgique, Bruxelles.
O. ORBAN, Professeur à l'Université de Liège.
ERNEST SOLVAY, Bruxelles.

COMITÉ EXÉCUTIF.

Président (Voorzitter): M. le Commandant CH. LEMAIRE.
Secrétaire Général (Algemeene Schrijver): M. le D^r M. SEYNAEVE, 51, rue du Palais, Verviers.
Secrétaire Administratif (Bestuurlijke Schrijver): M. J. COOX, Duffel.
Membres (Leden) M^{lle} E. LECOINTE, MM. L. BLANJEAN, Jos. JAMIN, L. JAMIN, Ed. MATHIEU, VAN DER BIEST-ANDELHOF, D^r R. VAN MELCKEBEKE.

UITVOEREND KOMITEIT.

Pour tous renseignements, adhésions, envoi de rapports, etc., s'adresser au Secrétaire Administratif:

Voor inlichtingen, inschrijvingen, opzending van verslagen, enz., wende men zich tot den Bestuurlijken Schrijver:

* M^r J. COOX, DUFFEL. *

EXTRAIT DES STATUTS.

ART. 1. — Il est fondé sous le titre de **Ligue Espérantiste Belge** (*Belga Ligo Esperantista*) une société des adeptes et des approbateurs de l'Esperanto en Belgique.

ART. 2. — La Ligue Espérantiste Belge a pour but de propager la langue auxiliaire internationale Esperanto, en dehors de toute question politique ou religieuse, et d'étendre les relations de la Belgique avec l'étranger.

ART. 3. — Pour atteindre ce but, la Ligue crée un fonds social pour aider les groupes Espérantistes, assurer l'existence de l'organe officiel de la Ligue, éditer et répandre des imprimés de propagande, organiser des conférences, des cours et des expositions espérantistes, et réaliser ou aider à réaliser tout projet qui, après mûr examen de la part du comité, aura été reconnu utile.

ART. 5. — Les cotisations des membres sont fixées comme suit:

- Tous les membres de la Ligue paient une cotisation annuelle minima de 1 fr. ou versent une fois pour toutes une somme de 25 francs.
 - Les membres qui paient une cotisation annuelle d'au moins 10 francs, ou qui versent en une fois la somme de 200 francs, reçoivent le titre de *Membre Protecteur*.
 - Les membres, qui paient une cotisation annuelle d'au moins 25 francs ou qui versent en une fois la somme de 500 francs, sont nommés *Bienfaiteurs de la Ligue*.
- Aux Membres Protecteurs et Bienfaiteurs la Ligue sert de droit l'organe officiel.

Uittreksel der Standregelen.

ART. 1. — Onder den titel «**Belgische Esperantische Bond**» (*Belga Ligo Esperantista*), is een Bond gesticht tusschen de personen welke in België het Esperanto beoefenen of goedkeuren.

ART. 2. — De Belgische Esperantische Bond heeft voor doel buiten alle politieke of godsdienstige strekking, de Hulpwereldtaal Esperanto te verspreiden en de betrekkingen van België met het buitenland te bevorderen.

ART. 3. — Om dit doel te bereiken sticht de Bond een geldfonds, ten einde de Esperantische groepen te helpen, het bestaan van het officieel blad van den Bond te verzekeren, allerhande propagandaschriften uit te geven en te verspreiden, Esperantoleergangen, voordrachten en tentoonstellingen in te richten, en alle ontwerpen welke na rijpe overweging van het Bondbestuur voordeelig blijken, te verwezenlijken of aan de uitvoering ervan mede te werken.

ART. 5. — De bijdragen der leden zijn vastgesteld als volgt:

- Alle leden betalen eene jaarlijksche bijdrage van ten minste 1 fr. ofwel storten eens voor al de som van 25 fr.
 - De leden welke eene jaarlijksche bijdrage van ten minste 10 fr. ofwel de som van 200 fr. in eens storten, worden opgenomen als *Beschermleden*.
 - De leden welke eene jaarlijksche bijdrage van ten minste 25 fr. ofwel 500 fr. in eens geven, verkrijgen den titel van *Weldoeners van den Bond*.
- De *Beschermleden* en de *Weldoeners* ontvangen kosteloos van wege den Bond het officieel blad.

LES 16 RÈGLES DE LA GRAMMAIRE ESPERANTO.

Alphabet. A, B, C (ts), Ĉ (tch), D, E (è), F, G (gue), Ĝ (dj), H (aspiré), Ĥ (ch flamand et allemand; pour les Wallons, le h de *bêhe, bâhe*), I, J (y yeux), Ĵ (j), K, L, M, N, O, P, R, S (ç), Ŝ (ch), T, U (ou), Ŭ (w pour les Flamands et les Wallons), V, Z.

Sauf les exceptions signalées entre parenthèses, toutes les lettres se prononcent comme en français. Elles gardent partout leur son alphabétique.

Règle 1. L'Esperanto n'a qu'un article défini *la*, invariable pour tous les genres, nombres et cas. Il n'a pas d'article indéfini.

Règle 2. Le substantif se termine par O. Le pluriel se forme par l'adjonction de *j*. — L'Esperanto a deux cas : le nominatif et l'accusatif; ce dernier est marqué par l'adjonction de *n*, tant au singulier qu'au pluriel : *la patro* = le père, *la patroj* = les pères, nominatif; *la patron* = le père, *la patrojn* = les pères, accusatif.

Règle 3. L'adjectif se termine par A et suit les règles du substantif : *patra* = paternel, *patraj* = paternels.

Règle 4. Les adjectifs numériques cardinaux sont invariables : *unu* 1, *du* 2, *tri* 3, *kuar* 4, *kvin* 5, *ses* 6, *sep* 7, *ok* 8, *naŭ* 9, *dek* 10, *cent* 100, *mil* 1000. Les numériques ordinaux se forment en ajoutant *a* aux cardinaux; ils deviennent ainsi de véritables adjectifs et en suivent toutes les règles : *la tria* = le troisième; *la triaj* = les troisièmes. Les multiplicatifs prennent le suffixe *obl* : *la duoblo* = le double; *la dekoblo* = le décuple. Les fractionnaires avec *on* : *la triono* = le tiers. Les collectifs avec *op* : *duope* = à deux.

Règle 5. Les pronoms pers. sont : *mi* (je, moi), *vi* (vous, tu, toi), *li* (il, lui), *ŝi* (elle), *ĝi* (il, elle, neutre), *si* (soi), *ni* (nous) *ili* (ils, elles). Par l'adjonction de A, ils deviennent adjectifs ou pronoms poss. : *mia* (mon), *miaj* (miens), *mian* (mien, accusatif). Les pronoms se déclinent comme les subst. : *min* = moi, *me* (accusatif).

Règle 6. Les terminaisons verbales sont au nombre de 12 : infinitif *i* : *fari* = faire; présent *as* : *mi faras* = je fais; passé *is* : *vi faris* = vous faisiez, vous avez fait; futur *os* : *ili faros* = ils feront; conditionnel *us* : *ŝi farus* = elle ferait; impératif *u* : *faru* = fais, faites; *ni faru* = faisons; *ili faru* = qu'ils fassent.

Participe actif : présent *ant* : *faranta* = faisant; passé *int* : *farinta* = ayant fait; futur *ont* : *faronta* = devant faire, qui fera.

Participe passif : présent *at* : *farata* = étant fait; passé *it* : *farita* = ayant été fait; futur *ot* : *farota* = devant être fait, que l'on fera.

L'Esperanto n'a qu'un seul verbe auxiliaire : *esti* = être. Le verbe ne change ni pour les personnes ni pour les nombres; en le combinant avec les participes passifs, on forme la voix passive : *Mi estas amata* = je suis aimé.

Règle 7. L'adverbe dérivé est caractérisé par la terminaison *e* : *patre* = paternellement.

Règle 8. Toutes les prépositions veulent par elles-mêmes le nominatif.

Règle 9. Chaque mot se prononce tel qu'il est écrit.

Règle 10. L'accent tonique se place toujours sur l'avant-dernière syllabe : *foiro, patrujo*.

Règle 11. Les mots composés s'obtiennent par la réunion des éléments qui les forment. Le mot fondamental se met toujours à la fin.

Règle 12. Si la phrase contient déjà un mot de sens négatif, l'adverbe « ne » se supprime; *mi vidas nenun* = je « ne » vois personne.

Règle 13. On met à l'accusatif le complément direct ainsi que le mot qui marque le lieu vers lequel on se dirige : *mi estas tie* = j'y suis; *mi iras tien* = j'y vais.

Règle 14. Chaque préposition a un sens immuable. Lorsque le choix de la préposition ne s'impose pas clairement, on emploie la préposition *je* qui n'a pas de signification propre. On peut aussi employer l'accusatif et supprimer la préposition, à condition qu'aucune amphibologie ne soit à craindre.

Règle 15. Les mots internationaux ne changent pas en Esperanto; ils en prennent seulement l'orthographe : théâtre = *teatro*.

Règle 16. La terminaison de l'article peut se supprimer et se remplacer par une apostrophe, après une préposition se terminant par une voyelle : *la pordo de l' domo* : la porte de la maison. Elle se supprime beaucoup plus rarement, de même que pour le substantif, dans certains cas notamment comme licence poétique : *Ho! mia kor!* = Oh! mon cœur!

DE 16 REGELS DER SPRAAKLEER VAN HET ESPERANTO

Alphabet. A, B, C (ts), Ĉ (tch), D, E (halfang), F, G (z. a. in het Nederlandsch), Ĝ (dj), H (geadspireerd), Ĥ (ch), I, J (z. a. in het Nederlandsch), Ĵ (z. a. in het Fransch), K, L, M, N, O, P, R, S, Ŝ (z. a. de Fransche ch), T, U (oc z. a. in het Duitsch) Ŭ (z. a. de Vlaamsche w) V, Z.

Behoudens de uitzonderingen tusschen haakjes aangeduid, worden al de letters uitgesproken als in het Nederlandsch. Zij bewaren altijd hunne alphabetischen klank.

Regel 1. Het Esperanto heeft slechts één bepalend lidwoord, nl. *la*, dat voor al de geslachten, getallen en naamvallen onveranderd blijft. Het niet bepalend lidwoord bestaat niet.

Regel 2. Het naamwoord gaat uit op O. Het meerv. wordt gevormd door bijvoeging van *j*. — Het Esperanto heeft twee naamvallen: den nominatief en den accusatief; deze laatste wordt gekenmerkt door bijvoeging van *n*, zoowel in het enkelv. als in het meerv. : *la patro* = de vader, *la patroj* = de vaders, nom.; *la patron* = den vader, *la patrojn* = de vaders, acc.

Regel 3. Het bijv. w. (adjectief) gaat uit op A en volgt de regels van het naamw. : *patra* = vaderlijk; *patraj* = vaderlijk(e).

Regel 4. De grondgetallen zijn onveranderlijk : *unu* 1, *du* 2, *tri* 3, *kuar* 4, *kvin* 5, *ses* 6, *sep* 7, *ok* 8, *naŭ* 9, *dek* 10, *cent* 100, *mil* 1000. De rangschikkende telw. worden gevormd met *a* bij de grondgetallen te voegen; zij worden aldus echte bijvoeglijke woorden en volgen er al de regels van : *la tria* = de derde; *la triaj* = de derde, meervoud. De vermenigvuldigings-telwoorden nemen het achtervoegsel *obl* : *la duoblo* = het dubbel; *la dekoblo* = het tienvoud. De breuken nemen *on* : *la triono* = het derde; de verzamelende telw. nemen *op* : *duope*, getweeën.

Regel 5. De persoonlijke voornaamwoorden zijn *mi* (ik, mij), *vi* (gij, u), *li* (hij, hem), *ŝi* (zij, haar), *ĝi* (het, hem), *si* (zich), *ni* (wij, ons), *ili* (zij, hen, hun). Door de bijvoeging van *a* worden zij bijvoegelijke bezittelijke woorden of voornaamwoorden *mia* (mijn), *miaj* (mijne, mv.), *mian* (mijnen, acc).

Regel 6. De uitgangen der werkw. zijn ten getale van 12: Noemvorm *i* : *fari* = doen; tegenw. tijd *as* : *mi faras* = ik doe; verl. tijd *is* : *vi faris* = gij deedt, gij hebt gedaan; toek. tijd *os* : *ili faros* = zij zullen doen; voorwaardelijke wijze *us* : *ŝi farus* = zij zou doen; gebiedende wijze *u* : *faru* = doe, doet; *ni faru* = laat ons doen; *ili faru* = dat zij doen.

Bedrijvend deelwoord. Tegenw. tijd *ant* : *faranta* = doende; verl. tijd *int* : *farinta* = gedaan hebbende; toek. tijd *ont* : *faronta* = zullende doen.

Lijdend deelwoord. Tegenw. tijd *at* : *farata* = gedaan (wordend); verl. tijd *it* : *farita* = gedaan (zijnde); toek. tijd *ot* : *farota* = zullende gedaan worden.

Het Esperanto heeft slechts één hulpwerkw. : *esti* = zijn. Het werkw. verandert noch voor personen, noch voor getallen; als men het met de lijdende deelw. vereenigt vormt men den lijdenden vorm : *Mi estas amata* = ik word bemind.

Regel 7. Het afgeleid bijwoord, wordt gekenmerkt door den uitgang *e* : *patre* = op vaderlijke wijze.

Regel 8. Al de voorzetsels vorderen den nominatief.

Regel 9. Ieder woord wordt uitgesproken zooals het geschreven staat.

Regel 10. De klemtoon valt altijd op de voorlaatste lettergreep : *foiro, patrujo*.

Regel 11. De samengestelde woorden worden bekomen door de vereeniging der elementen waaruit zij bestaan. Het grondwoord wordt steeds achteraan geplaatst.

Regel 12. Wanneer in den zin reeds een woord voorkomt met ontkenkende beteekenis, valt het bijwoord *ne* weg : *mi vidas nenun* = ik zie niemand.

Regel 13. In den accusatief staat het voorwerp, alsook het woord, dat de plaats aanduidt waarheen men zich richt : *mi estas tie* = ik ben er; *mi iras tien* = ik ga er heen.

Regel 14. Ieder voorzetsel heeft eene onveranderlijke beteekenis. Indien de keuze van het voorzetsel niet duidelijk bepaald is bezigt men het voorzetsel *je* dat geene vaste beteekenis heeft. Men kan den accusatief bezigen en het voorzetsel weglaten, indien zulks geen dubbelzinnigheid te weeg brengt.

Regel 15. De internationale woorden veranderen niet in het Esperanto; zij volgen er slechts de schrijfwijze van.

Regel 16. De uitgang van het bepalend lidwoord kan weggelaten en door een afkappingsteeken vervangen worden na een voorzetsel dat op eenen klinker eindigt : *la pordo de l' domo* : de deur van het huis. Hij wordt in zekere gevallen, maar zeer zeldener, weggelaten, zoo ook bij het naamwoord, namelijk als dichterlijke vrijheid : *Ho! mia kor!* = O, mijn hart!

JOURNAL ESPERANTISTE BELGE
MENSUEL.BELGISCH ESPERANTISCH
MAANDSCHRIFT.

Oficiala Organo de la « Belga Ligo Esperantista » kaj de la Belgaj Ligaj Grupoj.

Organe officiel de la « Ligue Espérantiste Belge »
et des Groupes Belges affiliés.

Officieel orgaan van den « Belgischen Esperantischen
Bond » en der Belgische aangesloten Groepen.

Estreco de « La Belga Sonorilo ».


ĜIS KIAM S^o SEYNAEVE HAVOS TEMPON POR REE OKUPI SIN PRI NIA GAZETO. ONI BONVOLU ĈION AJN — MANUS-
KRIPTOJN, SCIIGOJN, NOVAJN VERKOJN — SENDI REKTE AL :

REDAKTORO-ADMINISTRANTO : J. COOX, DUFFEL (BELGUJO).

LA NUNA ADRESO DE S^o SEYNAEVE ESTAS : 51, RUE DU PALAIS, VERVIERS.

Albumo de konataj Esperantistoj.

Dank' al afableco de S^o Schuck, aŭtoro de l' albumo, kiu pruntesendis al ni la kliŝaĵojn, ni povas tie ĉi montri, samtempe, specimenojn de l' portretoj de tiu albumo, kaj la vizaĝojn de du el la malnovaj amikoj de Esperanto kaj de la BELGA SONORILO, kiuj, bedaŭrinde, mortis antaŭ kelkaj semajnoj, kaj kies nekrologion ni publikigis en nia maja n^o.



A. MOTTEAU.
Anglujo.

† la 3^{an} de Marto 1906^a.

Por tiuj kiuj ne ankoraŭ scias pri la albumo, ni diru ke ĝi estas 55-paĝa; ke ĝi enhavas 111 portretojn montrantajn la ĉefajn kaj plej konatajn el niaj propagandistoj: membroj de la Lingva kaj Organiza Komitatoj, redaktoroj de niaj gazetoj, k. c., k. c..

La plej luksa eldonaĵo kiun Esperanto ĝis nun naskis, ĝi estas ankaŭ vera dokumento kaj bonega propagandilo, kies ellaboro ricevis la plenan zorgon de ĝia sindonema kaj inteligenta aŭtoro, Sinj^{ro} Schuck.

Devo estas ke ĉiu Esperantisto posedu ĝin, kaj ni admonas niajn amikojn ke ili ĝin tuj mendu.

Oni sendu la monon kun la mendo al

J. Coox,
en Duffel.

† la 31^{an} de Marto 1906^a.



HALDOR MIDTHUS.
Norvegujo.

† la 31^{an} de Marto 1906^a.

Niaj du gvidaj libroj en Esperanto.

Kiam ni dubas pri malfacilaĵoj de ia nacia lingvo, ni simple malfermas bonan gramatikon aŭ vortaregon, kiu tuj donas al ni la deziratajn klarigojn.

Sed en Esperanto?

Se la nekonata vorto estas formota, kunmetota, la laboro ne estas granda. Ĝi eĉ povas esti tre agrabla, ĉar, kelkfoje eltrovinte ian novajon, ni samtempe devas ĝoji pro la riĉeco kaj fleksebleco de nia bela helpa lingvo. Tamen, en tiu ĉi okazo, ni ofte timetas, pensante: Ĉu ĉiuj niaj novaj vortoj estas korektaj? Ĉu la samaj ideoj ne estas pli bone esprimataj per aliaj jam akceptitaj vortoj?

La dubo fariĝas ankaŭ pli grava, se oni estas uzonta malfacilan gramatikan esprimon, kiun oni neniam vidis en la bone konataj lernolibroj, kaj oni tiam diras, ekzemple: Ĉu mi devas uzi en tiu ĉi okazo akuzativon aŭ ne?

Por ambaŭ duboplenaj problemoj, la Bulonja Deklaracio donas la solvon:

« La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj Esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo « Fundamento de Esperanto », en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj « tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto. » Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », ĉiu Esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed, pro plena unueco de la lingvo, al ĉiuj Esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton. »

Kio estas tiu altege ŝatata Fundamento?

Ĝi estas libro, kies enhavo nepre estas konata de la tuta Esperantistaro. Ĝi konsistas el tri verketoj de Zamenhof: 1^o la 16-regula Gramatiko, 2^o la Ekzercaro, kiu de Beaufront kaj aliaj lernolibroj konigas kaj klarigas, 3^o la Universala Vortaro, donanta nur radikojn.

La Fundamento do prezentas nenion novan al laborema Esperantisto; ĝi neniel donas lingvajn detalojn, ĝi starigas nur, kiel ĝia nomo diras, ian elementaron, ian principaron de la lingvo. Efektive, ĝi estas nur minimumo, sed tiu ĉi minimumo estas la netuŝebla kerno de la lingvo Esperanto.

Nu, lingvo estas ĉiam kiel maro da vortoj kaj esprimoj, kaj eĉ la plej simpla povas prezenti malfacilaĵojn al komencantoj. La Fundamento tute ne povas kontentigi studentojn kiuj intencas perfektigi. Tial la Bulonja Deklaracio rekomendas al ni la aliajn verkojn de la kreinto de Esperanto, kaj Zamenhof mem resendas nin al pli dika libro, kiu vere povas esti konsiderata kiel la *Biblio* de Esperanto. En la Fundamento li ja sciigas (P. 81):

« La plej grava libro por ĉiu, kiu deziras perfektigi en la lingvo Esperanto estas la verko

Fundamenta Krestomatio, kiu konsistas el 458 paĝoj kaj enhavas tre multe da plej diversa materialo por legado en la plej modeta Esperanta stilo. (Kosto fr. 3,50).

* * *

Fervore studinte nian karan esperantan evangelion, mi pensas certe utili al la legantaro de la B. S., donante tie ĉi kelkajn interesajn lingvajn detalojn kaj konkludojn pri la Fundamenta Krestomatio.

Antaŭ ĉio, mi tre rekomendas al ĉiuj la legadon de tiu ĉi fundamenta verko: ĝi ne sole enhavas la konatan ekzercaron, belegajn fabelojn, rakontojn, spritaĵojn, interesajn utilaĵojn, sciencaĵojn, propagandajn artikolojn, delikatajn poeziojn, k. t. p., originalajn aŭ elektitajn laŭ ĉies gusto el multe da literaturoj; sed ankaŭ, kiel ni legis supre, ĝi estas nia provizora gvidilo pri lingvaj malfacilaĵoj.

Artikolo. — En la F. K. ni renkontas, pli ol unu fojon, la nedifinitan artikolon *unu* (ne la numeralon!). Ekz.: Li iris sur *unu* homplenan straton kaj sidigis en *unu* oportuna anguleto (Paĝo 67^a) — *Unu* fojon vojaĝis la profeto (P. 32).

Tamen, ĉar tiu ĉi uzado ne estas ĝenerala, ni konsilas tute ne uzi tiun artikolon. Tie, kie oni nepre bezonas enmeti vorteton por bonsonco, oni uzu *ia*.

Nomoj kaj Adjektivoj. — El la F. K. ni povas lerni ke grandega libereco estas permesata por la formado de vortoj, kondiĉe ke tiuj ĉi estu klaraj kaj regule formitaj.

Ne estas prilingva danĝero, se tiamaniere ni kreas egalsencajn vortojn, ekz.: alestanto, apudstanto, ĉeestanto, ĉar iliaj signifoj estas tiel klaraj kiel samaj.

Se niaj gelegantoj ne ankoraŭ konas la sekvantajn vortojn, tiuj ĉi almenaŭ estas tre kompreneblaj por ĉiuj: trinkmono, memmortigo, antaŭulo, samtempulo, akvoturnejo, superakvego, tremfrosto, klakĉapelo; malfruinta, nigrablua, helflava, palruĝa, altkreska, enpenso, enlanda, k. t. p. — Ĉu vi ŝatas mangi *patkukojn*? Ricevi *patkukon* estas certe pli agrable ol ricevi *survanganon* de kolerega viro!

Sed la F. K. ne ĉie prezentas kunmetitajn nomojn, kie Flandranoj kaj Germanoj certe uzus ilin; ĝi ofte metas la unuan vortparton kiel adjektivon. Ekz.: ne stratobubo, sed strata bubo, ne bankokuvo, sed bankuvo; tiel ankaŭ: ŝpara banko, lua pago, veturigista kaleŝo, fiŝa vosto, ĉefa peko, skriba plataĵo, naskotaga festo, k. t. p.

La vorto *tiu* ofte estas kunigita kun *sama*. Ekz.: *tiu sama vojo*, kiel..., *tiu sama maŝino*, kiel nun..., en *tiu sama momento*, kiam (angle: very).

El la « Virineto de Maro » ni lernas ke la plimulto da ŝipaj terminoj estas el germana deveno: ŝipo, kilo, terdeko, rando, masto, ŝauregaro, kajuto, k. t. p.

Verboj. — Oni senpene trovas la signifon de jenaj verboj: formangi, samtempigi, rapidi, malfrui, konatigi kun, malsaĝigi, nevidebliĝi, k. t. p.

Interesaj estas la verboj: La ŝipo *ennaĝis* en la havenon (F. K. P. 54) — *enbati* la pordon (P. 144).

La F. K. faras oftegan kaj specialan uzadon de la afikso *ad*, kaj ne ĉiam en laŭregulaj okazoj, ĉar:

1^o Ni trovas tiun ĉi alvorton eĉ por nelonge daŭrantaj agoj: Ŝi nun observadis kiu venos al la mal-

feliĉa reĝido (P. 43) — ŝi mangigadis testudon el sia buso (43) — ŝi aĉetadis ŝtofon (136) — neniu observadis la levadon de la kurteno (143).

2^o Ni renkontas ĝin eĉ por esprimi agojn, kiuj nepre nur devas daŭri longe: Orkovritaj kupoloj sin levadis super la tegmentoj (45).

Oni rimarku tion ankaŭ en la antaŭparolo de la F. d. E.

Tio estas atentinda, precipe nun kiam la ĝenerala laŭregula uzado de tiu alvorto maloftiĝadas en niaj esp. revuoj kaj ĵurnaloj.

Adverboj. — Ni malfacile povus, kiel en aliaj lingvoj, nomi esperantajn adverbojn neŝanĝeblaj vortoj. La akuzativo ilin tre ofte ŝanĝas. El la F. K. ni pruve prenas:

Ne rerigardante posten — traduki esperanten — ni iras tien kaj reen — li montris supren, k. t. p.

Nenia lingvo, krom Esperanto, povas adverbete esprimi tiom da diversaj ideoj! Bonvolu rigardi:

Nome, vide, aŭde, — ŝi falis sensente — vole ne vole — ĉiuj siavice — li senvorte obeis — senrefare — se mi vin nevole ofendis — ni envoje renkontis — kaj eĉ: *kelkaj frake vestitaj sinjoroj!*

La vorteto *plu* preskaŭ neniel aperas en la F. K. Anstataŭ la de francaj Esperantistoj uzataj esprimoj: ne plu, neniam plu, neniu plu, k. t. p. — oni trovas preskaŭ ĉie: jam ne, jam neniam, jam neniu k. t. p. (P. 49, 50, 57.)

Prepozicioj. — Ni do alvenas al la plej grava parto de nia studo, precipe por tiuj lernantoj, kiuj ne bonege konas la germanan lingvon: la direkta akuzativo!

Kie uzi ĝin? kie ne? — La lernolibroj sufiĉe sciigas pri la ĉefaj reguloj. Sed, kion fari en duba okazo?

Elskribinte centon da interesaj akuzativaj esprimoj el la F. K., mi pensas povi rajte konkludi, ke ĝenerale ni devas sekvi la germanan uzadon, koncerne *auf*, *über*, *in*, k. c. *Do, se la verbo esprimas agon, kiu sin direktas al donita celo, loko aŭ objekto, eĉ figure aŭ morale, la kuniranta prepozicio postulas akuzativon ĉe la nomo de tiu loko aŭ objekto.*

Por plifaciligi la aferon, ni povus diri: uzu akuzativon, *se la signifo de la verbo similas la sencon de: meti, enmeti, surmeti, (skribi = meti literojn sur) jeti, (rigardi = jeti rigardojn), iri, veni, fali, sendi (montri = sendi direktajn signojn al).*

Elektita serio da pruvaj ekzemploj sendube estos ŝatata de nia legantaro:

Mi povas vin kaŝi en mian poŝon (P. 61).

Kaptante la ĉapon en la manon (70).

Li eliris duonon da krono el sia poŝo kaj premis ĝin al Swift en la manon (73).

Ili montris sur la malplenan teksilon (22).

La patro ŝin enŝlosis en ĉambron (124).

Por turni vian atenton sur viajn efektivajn verajn amikojn (28).

Ali falis sur la genuojn (31).

Li mallevis sin sur la genuojn (120).

Kiam la festo falos sur Grandan Vendredon (183). Se ni eliros en la koridoron (215).

La interna varmo de la tero ne havas influon sur ĝian supraĵon (184).

Volu enskribi la sumon en nian krediton (229).

Rigardi tra la klaraj vitroj en la kajuton (41: tra,

montrante la vojon, la ilon de la ago — Lat. ablativo instrumental —; en, *la celon de la direkto*).

Murmuro kuris tra la teatro (143 *tra*, vojo, ilo nenia celo!)

Kiam ni pasis preter la stacio (141, *preter*, vojo, ilo).

Rapidaj manoj portas trans la havena ponto la poŝtajn sakojn el la ŝipo sur la bordon (220, *trans*, vojo, ilo, *sur*, celo de la direkto).

Ŝi supreniris sur la ŝtuparo (52, *sur*, vojo, ilo).

Ili ja povas flugi sur ŝipoj trans la maron, (*sur*, vojo, ilo, *trans*, celo) sin levi sur la altajn montojn (45, *sur*, celo).

Sova pordo kondukas en grandegan ĉambron najbaran (215).

Arta lingvo estos enkondukita en komunan uzadon (300).

Ponto kondukas super profunda rivero (141, tiu rivero ne estas la celo de la ago).

Ŝi sidigis sur la koton de la strato (67, koton = celo, alveno).

Ŝi sidigis en unu oportuna anguleto (67, sed sur ian objekton!)

Vi estas enamita en Ella'n (149).

Ĉu supraj ekzemploj ne estos ŝatinda gvidilo en dubaj okazoj?

Tamen, kiel ĉiu respektinda biblio, la F. K. kelkfoje estas sinkontraŭdiranta. Tiel sur la 185^a paĝo oni trovas: La urbanoj rapide sin kaŝas en la domoj kaj kaŝitaj anguloj. Komparu supre, p. 61 kaj 166. — En ia anekdoto ni legas: skribi per kredo sur la nigra tabulo (p. 84). Estas nature kontraŭ la supre donita ĝenerala regulo kaj la ekzemplo p. 229. Alia parte, Gasse en sia *Esperanto*, laŭ la natura metodo, kontraŭe donas: skribi sur la nigran tabulon (P. IX). Kaj la tre kompetenta Grabowski eĉ impresigis en sian *Kondukanto'n* (P. 10) la jenan rimarkindan germanan akuzativon: Ĉu mi povas kalkuli sur vin?

Tial ni povas konkludi ke la cititaj ekzemploj estas verŝajne nur preseraroj. Tiel same la verbo: Kiam nia vivo *ĉesiĝas* (P. 45 — V. Gram. de Beaufront p. 93).

Antaŭ ol fini tiun ĉi (al ĉiuj studentoj espere utilan) raporton, mi elskribos kelkajn esperantismojn, kies traduko ne estas malfacila, kaj kiuj povas esti uzataj en la ĉiutaga vivo:

Li vokas pro helpo la sanktan Nikolaon (61).

Plenumi komision (73).

Estu tute kiel dome (72) — hejme!

Por la dua manĝo (gerecht, plat) mi prenos angilon (72).

Ĝi ne estas inda je danko (72).

Mi ne forgesos pri la trinkmono.

Li mordis la lipojn (76).

La horoj de la opero lasis ion por deziri (78).

La vestaĵo sidas bonege (24, past, sied).

Konatigi kun tia idiomo (31).

En ĉia okazo (115).

Ĉio transturniĝis la fundo supren (117, 't onderste boven, sens dessus dessous).

La infano ripozis per trankvila dormo (118).

Kaj fine... mi ankaŭ intencas ripozi!

FRANS SWAGERS



Eĥoj kaj Novaĵoj el Esperantistujo.

Tutmonda Ligo inter gejunularo kaj geinstruistoj.

De nia amiko S^o Frenkel (Rusujo) ni ricevis fotografan papereton, ne pli grandan ol malgranda vizitkarto, per kiu la sendinto diskonigas projekton de Tutmonda Ligo, enhavonta gelernantojn kaj geinstruistojn.

Li petas adresojn: de tiuj kiuj aprobas la ideon, de instruistoj kaj lernantoj kiuj deziras korespondi kun kolegoj per Esperanto, de instruistoj neesperantistaj; ankaŭ portretojn de instruistoj, kaj grupajn fotografajn de lernantoj esperantistaj kaj de iliaj lernejoj; li konsilas ke ĉiuj instruistoj faru same kaj interesanĝu fotografajn. Li reciprokos, kaj sendos fotografajn interesanĝe.

Li intencas proponi ke la gazeto «*Juna Esperantisto*» fariĝu oficiala gazeto de la Ligo; la jara kotizaĵo estus 5 fr., kaj oni ricevus senpage la organon; la redaktejo de l' ĵurnalo estus sidejo de la Ligo.

Tiuj kiuj aprobas la ideon kaj deziras helpi la aferon povus aliĝi, kaj li petas ke tiuj skribu al li.

Se la Ligo efektiviĝos, li proponos, krom reciproka interkonatiĝo, interrilatojn kaj korespondadon de geinstruistoj kaj gelernantoj, dissendon de alvoko kaj de diversaj presaĵoj al instruistoj kaj lernantoj, eĉ neesperantistaj (por tiuj ĉi oni aldonus ŝlosilojn Ĉefeĉajn).

Li intencas sendi pli detalan raporton al la Kongreso.

S^o Frenkel citas la vortojn de S^o Boirac:

«Propagandi nur inter la plenaĝuloj estas kvazaŭ klopodi por plenigi la barelon de l' Danaidinoj».

Li aldonas ke efika laboro povas okazi nur ĉe gejunuloj.

Ni tute konsentas kun nia amiko: gejunulojn ni bezonas altiri inter nin kiel eble plej; tiel, ni havos la estontecon por ni.

Sed, ĉu ligo tutmonda estas vere necesa por atingi tiun celon? Kian utilon ĝi alportus? Ĉu la instruistoj — kaj aliaj propagandistoj ĉiuspecaj — ne povas bone klopodi en sia lando, sen ia centra-eksternacia organismo? Ĉu oni ne povas trovi eksternaciajn korespondantojn, eĉ sen tia organismo? Por tio, oni povas sin turni almenaŭ al redaktejoj de l' naciaj gazetoj, al direktantoj de l' naciaj ligoj, de l' lokaj grupoj.

Aliaflanke, ĉu oni trovos multe da lernantoj kiuj intencas korespondi eksterlanden? Ili — plej ofte — havas nek tempon nek monon; sekve, pri tiu punkto la propono ŝajnas sencela.

Tiu projekto de Tutmonda Ligo estas nova formo de simila projekto jam prezentita antaŭ la Boulogn'a Kongreso. Oni scias kiom malfavore ĝi estis konsiderata, kiajn danĝerojn oni vidis en ĝi, kaj ke, fine, oni forjetis ĝin.

Nia intenco ne estas malkuraĝigi nian fervoran propagandiston; sed, ni kredas ke, se ni rajtas laŭdi tion kion ni opinias bona, ni devas ankaŭ montri la danĝeron de proponoj tro frue alvenintaj, nesufiĉe maturaj por ricevi efektiviĝon, aŭ, eĉ, kies celo ne estas sufiĉe klara.

REZULTATO

de l' Konkurso por afiŝoj de l' Kongreso.

- 1^a «Unuiĝo per Kompreniĝo» — S. de Coninck, Marseille. Premio da 50 fr.
 - 2^a «Verdo de l'Espero» — S. Firmin Baeyens, Anvers.
 - 3^a «La Suprématie» — S. Tom Yuile, Glasgow.
 - 4^a «La Prezidanto» — S. J. A. Woodhead, Leeds.
 - 5^a «Verda Stelo» — S. Finez Grégoire, Paris.
 - 6^a «Signo» — Alfred J. Hulme, Shrewsbury.
 - 7^a «L'Ami Karo» — S. J. Chapuis, Lyon.
 - 8^a «Esperanto» — S. W. W. Hide, London.
 - 9^a «En la Mondon venis nova sento» — S. Louis Bernard, Paris.
 - 10^a «Naŭ horoj» — P. Wilhardt, Kjöbenhavn.
 - 11^a «Voli estas povi» — J. T. Stynen, Anvers.
 - 12^a «La Venkonto» — S. Morineau, Québec, k. c.
- Kelkaj samideanoj sendis al ni ŝatindajn projektojn, sed, bedaŭrinde, ili subskribis ilin, malgraŭ la regularo de l' Konkurso, kaj ni ne povis ilin klasigi. Al ĉiuj, la Komitato esprimas varman dankon.

Unu sekretario,
EMILE BERNARD.

La duan lokon, en tiu konkurso, okupas unu el niaj amikoj, membro de la Antverpena Grupo, abonanto de nia gazeto, S^o F. Baeyens. En la nomaro, ni ankaŭ vidas la nomon de alia membro de A. G., S^o J. Stynen.

Niajn plej korajn gratulojn al tiuj agemaj samideanoj.

El Italujo.

Nia estiminda samideano S^{ino} R. Junck sciigas nin ke la monon kolektitan por Kalabranoj (316 fr.) ŝi transdonis al la itala societo de la Ruĝa Kruco kaj ke, pro tio, ŝi sukcesis esperantigi tiun societon. Ŝi petis ke la societo danku per la lingvo Esperanto, kaj ĝi tion faris per aldonita ŝlosilo.

La glora verkisto itala Edmondo De Amicis, al kiu nia fervora propagandistino klarigis nian lingvon kaj montris librojn kaj ĵurnalojn, permesis ke ŝi traduku Esperanten lian belan verkaĵon: «Kverko kaj Floro», kaj ankaŭ unuaktan dramon.

S^{ino} Junck aldonas ke S^o De Amicis estas en la ministra konsilistaro de Instruado; ke, sekve, la favoro kiun li donas al Esperanto estas afero ja grava.

El Hispanujo.

Grupo Esperantista de Bilbao. — Fine, dank' al l' energiaj klopodoj de S^o Elizondo kaj de kelkaj aliaj fervoraj samideanoj helpintaj lin efike, oni sukcesis fondi definitive, en grava ĉefurbo Bilbao, Grupon Esperantistan kies nombro pligrandiĝanta senĉese permesas antaŭvidi prosperan sorton por nia lingvo en tiu ĉefurbo.

Jen ĝia komitato: *Prezidanto*, T. Elizondo; *Vicprezidanto*, V. O. Allende; *Sekretario*, R. Unzaga; *Kasisto*, M. Zabala; *Voĉdonantoj*, J. Santamaria, I. Lorente kaj J. Aguirreche.

Plena adreso de la Grupo: Grupo Esperantista, Strato Garcia Salazar, Bilbao (Hispanujo).

Nova Signo Esperantista.

Priparolante la novan pinglon de la Frankfurt'a Grupo, ni forgesis diri ke la prezo kiun tiu grupo transdonis pliiĝas po 10 pfeningoj por internacia transsendo.

Sekve: 30 pf. po 50 pingloj; 45 pf. po 100 pingloj.
LA BELGA SONORILO liveros ilin jene, afranke en Belgujo:
50 pinglojn po 40 centimoj;
100 » » 60 »

PRESARO.

Esperanta Ligilo.

Monata revuo por blinduloj.

Jara abono: fr. 3,00 ĉiulanden.

Direktoro: Th. Cart, 12, rue Soufflot, Paris. — Tria jaro (1906). n^o 5^a, Majo. *Enhavo*: Kroniketo (Fanny Ducret, Th. C.) Interparolado. Vizito. Problemo. Humoraĵo. Ŝirbastonoj (Th. Cart). Poezio: el Heine. Korespondado (Brown). Miksaĵo: Nombro da loĝantoj. Proverboj. Felietono: Perdita kaj trovita (Boirac).

Lingvo Internacia.

15 majo. — S. Meyer: La Rochelle. — François Coppée: Pereinta en maro. — E. Pargaetzi: Remomoro (originala versaĵo). — Oscar Wilde: La najtingalo kaj la rozo. — Paul Champion: Terkultura kalendara (Majo). — Movado esperantista. — Bibliografio.

1 junio. — Georges Renard: Strikoj koj arbitracio — V. Hugo: Historio de Cosette. — Miksaĵoj: Prof. Vorobjev; Poŝtkartoj ilustritaj; Novaĵo por blinduloj; Kontraŭ absinto; Por la Lapoj; Oni parolas fremdlingve; Nuntempa; Japanaj proverboj; Bagateloj. — Paul Champion: Terkultura kalendara (Junio). — René Deshays: Ujo, Arbo, Lando, gramatika versaĵo. — G. Queste: Modo ordona en dependaj propozicioj. — Diversaĵoj: La Sankta Biblio Esperante; Pri la Geneva Kongreso; Ankoraŭ pri Dilpok: Laste-aperintaj verkoj; Kelkaj vortoj de la Redaktoro; Nova ĵurnalo Esperanta.

En tiu n^o de *Lingvo Internacia*, ni legas artikolon titolatan «Strikoj kaj Arbitracio», en kiu la aŭtoro konigas la manieron uzatan en Nova-Zealande por solvi la demandon: arbitracian kortumon lege starigitan, konsistantan el tri membroj; unu riprezentas la laboristajn sindikatojn, unu la mastrajn sindikatojn; la tria estas delegato de la Ŝtato.

La konfliktoj alvenas unue antaŭ *Konsentiĝa* (?) *Konsilistaro'n*, konsistantan el membroj poduone elektitaj de l' mastroj kaj poduone de l' laboristoj. Ĝia tasko estas solvi amike la malkonsenton; nur se ĝi ne sukcesas, ĝi transdonas la aferon al la *Arbitracia Kortumo*.

Tiuj kiuj okupas sin pri sociaj temoj legos profite la artikolon, ja kvar-paĝan.

J. Coox.

Tra la Mondo.

GERMANA KANTO

“Wanderlied”

DE J. KERNER.

LIBERE ESPERANTIGITA

de Frans Swagers.

MUZIKO DE

ROB. SCHUMANN

Op. 35 No 3

Sämtliche Lieder.

Ni trinku pokalon da fajroplena vin'!
Jen estas la tempo por jam disigi nin!
La hejman feliĉon forlasu, mia kor':
Tra mondo la vasta ni flugu nun for!

Ne haltas la suno sur ia blua mont',
Ne restas rivero ĉe sia klara font',
Ne ŝaumas ondaro sur sama mara rand',
Ventegoj blovegas kun bru' tra la land'.

La nuboj rapidas kaj kovras sub mantel'
La birdon flugantan al varma sudĉiel',
Por trovi plorantan la knabon en l'arbar',
Serĉantan laboron sur fremda landar'.


La knabo silentas, kaptite per ĉarm',
Kaj liaj okuloj ekbrilas per larm':
La birdan kanteton rekonas li tuj,
La birdo, ĝi venas de lia patruj'!
Ĝi vidis la domon sub verda tili',
Alportas de hejme saluton por li.
Per birdaj flugiloj alvenas l' esper'
Kaj l'amo lin sekvas sur tuta la ter'!...

Ni trinku pokalon da fajroplena vin'!
Jen estas la tempo por jam disigi nin!
La hejman feliĉon forlasu, mia kor':
Tra mondo la vasta ni flugu nun for!

F. SWAGERS.

(Tiu ĉi kanto estas kantota dum

la festoj de la Geneva Kongreso.)



GRATULOJN!

Ni sciigis kun granda plezuro ke lia Reĝa Moŝto Leopold II^a nomis Sinjoron François Van Pelt kavaliro de sia ordeno. Sinjoro Van Pelt, apotekisto, membro de la Provinca Medicina Komisiono, estas membro de l' Komitato de la Antverpena grupo Esperantista kaj unu el la fondintoj de tiu grupo. Dum sia tuta vivo li montris sin fervora pioniro de ĉiuj progresaj ideoj bonaj kaj belaj, kaj ĉie li renkontis ĉirkaŭ si plej sinceran simpatian. Akceptu li niajn plej korajn gratulojn!

L'Esperanto à l'Étranger.

Allemagne. — Le 20 mai s'est fondée à Braunschweig la « Germanlingva Esperantista Societo », destinée à réunir tous les Espérantistes de langue allemande. La gravité de la nouvelle n'échappera pas à quiconque connaît l'activité déployée depuis un an par les différents groupes d'Allemagne. Il y a quelques mois, « *Germana Esperantisto* » a proposé que chacun des grands groupes allemands se spécialise dans une branche déterminée ; c'est ainsi que le groupe de Hambourg centraliserait la propagande commerciale ; Berlin aurait dans ses attributions le compartiment des sciences, Vienne organiserait le mouvement parmi les aveugles, Francfort s'occuperait de rallier les journaux allemands, etc. Il est à peine nécessaire d'insister sur les avantages que procurerait pareille organisation, que la fondation de la Société Allemande va probablement permettre de rendre effective.

En tout cas, c'est une idée que l'on pourrait utilement méditer ailleurs ; elle servirait à secouer la torpeur des groupes qui, dans certains pays, croient faire beaucoup pour la cause espérantiste en enseignant le contenu d'un livre d'étude à un nombre plus ou moins grand d'auditeurs. (*)

Le Comité de la nouvelle société est composé comme suit :

Président : Dr E. Mybs, 68, Markstrasse, Altona ;
Secrétaire : Dr J. Hanauer, 5, Bleichstrasse, Francfort s/M. ;

Troisième : M. F. Schuck, 16, Thomaestrasse, Braunschweig.

Nouveaux groupes à Magdebourg, à Merseburg, à Lemberg (Gallicie), où un cours vient d'être ouvert avec 170 élèves, et à Reichenberg.

À Munich, notre ami L. Meier a réussi à rallier le Journal « *Münchener Neueste Nachrichten* », jusqu'alors hostile. Le Dr Hanauer a donné une conférence à l'Union Commerciale de Francfort ; M. Feyerabend donne un cours spécial pour employés de banque. M. Kuchler, président du groupe de Francfort, a été nommé membre du Comité de la Ligue Pacifiste de cette ville (plus de 1000 membres), afin qu'il puisse plus facilement propager l'Esperanto parmi les Pacifistes. Articles favorables dans divers journaux, spécialement dans *Union*, bulletin mensuel des professeurs de langues vivantes, et dans *Bankbeamten-Zeitung*, tous deux de Berlin, ainsi que dans *Bayerische Verkehrsblätter*, *Das Echo*, *Weltwarte*, *Frankfurter Warte*, *Ludwigsburger Zeitung*, *Frankfurter Oderzeitung*, *Münchener Allgemeine Zeitung* ; *Leipziger Neueste Nachrichten* publie un article de M. Stephan, sous le titre de « Apprenez l'Esperanto ».

Suède. — On annonce des groupes fondés à *Stetteryd*, *Ronneby*, *Oskarström* ; il est à remarquer que les groupes suédois sont principalement com-

(*) Ces lignes étaient composées lorsque nous avons reçu la circulaire annonçant la division de la propagande entre les groupes suisses ; voir, dans notre rubrique **ÉHOJ**, du n° de Juin, l'article concernant la *Svisa Esperanta Societo*.

posés d'ouvriers, ce qui semble dénoter chez l'élément prolétaire du Nord une intellectualité plus développée qu'ailleurs.

Angleterre. — Le Groupe Espérantiste de Londres a eu, le 15 avril, la visite de 24 Espérantistes étrangers : des Russes, des Finlandais, des Allemands, des Français, des Autrichiens ; parmi eux, quelques-uns étaient des délégués de la Fédération Internationale des Employés, venus pour le Congrès des Employés.

À Hillhead (Glasgow), le président du Groupe donne un cours pour agents de police, employés de tramway et de chemin de fer. Nouveaux groupes à *Loughborough*, *Grimby*, *Goole*, *Oswenstry*, *Sheffield*, *Newport* ; aussi à *West Norwood*, sous la présidence de notre ami Cefeè. À Leeds, le « *Northern Institute* » (Ecole de Commerce du Nord de l'Angleterre) a porté l'Esperanto à son programme au même titre que les autres langues ; le cours en est donné par M^r Maréchal, sous-directeur de l'Institut.

Espagne. — Le journal « *El Correo Espanol* », l'un des plus importants du pays, a publié un long article sur l'Esperanto. Un groupe s'est fondé à *Tarankon*, et l'Esperanto a acquis droit de cité à la Chambre de Commerce de *Burgos*. Un groupe vient de se fonder dans cette dernière ville. Nouveau groupe aussi à *la Guardia*.

On vient de fonder la société « *Espero Kataluna* » à Barcelone. Un journal de cette ville. « *La Academia Calasancia* » a, dans plusieurs n°s, publié des articles favorables à l'Esperanto.

Russie. — Le moment n'est sans doute pas encore bien choisi pour une propagande générale ; mais on travaille quand même, de-ci de-là. Un groupe s'est fondé à *Nova-Brudno*, près de Varsovie ; à *Tiflis*, le groupe travaille énergiquement, sous la direction du Général Rešetin, du Professeur Avilov et du Dr Pišer ; un cours a lieu tous les dimanches. *Karbin* est depuis longtemps un centre espérantiste très-actif et continue, paraît-il, à mériter sa réputation.

« *Ruslanda Esperantisto* » signale que le livre d'adresses de la ville de *Saratov* contient une grande annonce pour l'Esperanto, grâce à l'intervention de M. G. Davidov.

Japon. — Nous apprenons par « *British Esperantist* » que l'Esperanto fait de grands progrès au Japon ; nous avons, il y a quelques mois, signalé un cours à Okayama ; un nouveau vient de s'y ouvrir, avec 433 élèves dont 350 Japonais. Le correspondant de B. E. croit que l'Esperanto prendra pied au Japon, quoiqu'il diffère entièrement de la langue du pays.

Australie. — Un journal de *Melbourne* a publié un article sur l'Esperanto et annoncé l'existence d'un groupe espérantiste dans cette ville.

Il y a tentative de fondation d'un groupe à *Christchurch* (Nouvelle Zélande) d'où nous nous souvenons avoir reçu une correspondance en

La Presse Espérantiste.

Espero Pacifista attire l'attention des Espérantistes sur la « *Internacia Societo Esperantista por la Paco* », dont il est l'organe officiel. Le fond du programme de la Société est, comme le dit l'art. 1^{er} de son règlement : 1° résoudre les difficultés internationales par l'arbitrage et travailler au rapprochement des peuples, 2° faciliter la tâche des autres Sociétés pour la Paix, en propageant parmi elles la connaissance et l'usage de l'Esperanto.

Dans son n° 10, « *Espero Pacifista* » fait remarquer que ni lui ni la Société dont il est l'organe n'ont quoi que ce soit de commun avec la propagande antimilitariste entreprise dans certains pays, et que l'idée de pacifisme est indépendante de l'idée d'antipatriotisme ou d'internationalisme.

L'adhésion à la Société comporte une cotisation annuelle de 5 fr., avec service gratuit de la revue. On admet des adhésions par groupes de 5 personnes moyennant une somme fixe de 5 fr., + 0,50 par personne, soit pour 2 personnes 6 fr., pour 5 personnes fr. 7,50.

On peut s'abonner à la revue (5 fr. l'an) sans adhésion à la Société.

S'adresser à M^r Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine, France.

J. Coox.

Esperanto, il y a plus d'un an. Le secrétaire du Comité provisoire annonce qu'il recevra avec plaisir les Espérantistes étrangers à l'occasion de l'Exposition internationale qui aura lieu en cette ville de Novembre 1906 à Avril 1907. Avis aux amateurs de voyages autour du monde.

Etats-Unis. — *L'Espérantiste* annonce que l'Esperanto se développe de façon satisfaisante dans plusieurs villes de l'Amérique du Nord. Il cite les groupes de *New-York*, *Philadelphie*, *Cambridge*, *Everett*, *Portland* ; *Boston* possède plusieurs organismes : « *Boston Esperanto Society* », « *Esperanto Club de la Technology Club* », « *Blindula Klubo en la Perkins Institution* ». Un club de dames a été fondé parmi les anciennes élèves du « *Massachusetts Institute of Technology* ».

L'intérêt s'éveille aussi dans les écoles supérieures : à *Boston*, à *Placksburg*, à *New-Brunswick*, à *Baltimore*. Un mouvement existe dans un grand nombre d'autres villes, et il n'est pas excessif de prévoir, dans un délai assez rapproché, l'Esperanto faisant tache d'huile aux Etats-Unis et s'y répandant comme il s'est répandu en Angleterre, avec une rapidité foudroyante.

La grande presse américaine soutient le mouvement, d'ailleurs, et des journaux tirant à 100,000 exemplaires, comme le *Christian Endeavour World*, et à 500,000 ex. comme le *Ladies Home Journal*, publient des articles nettement favorables.

La sabata gasttablo de Antverpenaj Esperantistoj.

